
TAMEN ★ PLU!

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO MARTO 2006 / JARKOLEKTO 25

Bob Felby - Tel (08) 8242 1460 - 6 Dorset St. Semaphore Park. S.A. 5019 - esperantobob@iprimus.com.au

Ankaŭ disponebla surrete ĉe la retejo de Esperanto en SudaŬstralio: <http://sa.esperanto.org.au>

Du ĵusgeedziĝintaj paroj kune iris al siaj postgeedziĝaj ferietoj. Ili enloĝigis sin en la saman hotelon. Iliaj identaj ĉambroj situis sur la sama etaĝo.

La unuan vesperon ili estis iomete lacaj kaj decidis enlitiĝi tuj post la vespermanĝado. Sed, tuj kiam ili estis premintaj la liftobutonon, la elektro decidis malfunkcii en la tuta hotelo. Anstataŭ supren iri lifte ili estis devigataj iri supren piede laŭ la ŝtuparo. Ili blindpalpis al siaj ĉambroj kaj senvestigis sin en la mallumo.

Antono, kiu estis tre religiema, genufleksis apud la lito dirante sian vesperpreĝon. Li apenaŭ finis, kiam la lumo retrovenis en la ĉambron. Je sia granda surprizo, li vidis ke ne estas lia edzino, kiu kuŝas en la lito, sed Grethe, tiu de lia amiko.

Panike Antono kuregis al la pordo. Malantaŭ si li aŭdis la kvietigan voĉon de Grethe.

“Estas tro malfrue, mia Egono ne malŝparas sian tempon dirante vesperpreĝojn!”

Edukado

Se vi vere deziras lerni kiel senerare uzadi Esperanton, tiam trastudu pli ol nur unu fojon la verkon por la nova jarmilo: ”Lingvaj Resondoj”.

Tiu ĉefverko de la fama Esperantologo kaj nemalhavebla instruisto, kiu ĉiam invitendas, kaj aktivas, en niaj Somerkursaroj kaj Kongresoj, Marcelo Leereveld, haveblas nun de la verkinto, 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur \$22,00.



En maljunulejo unu el la gastoj sidas paroletante manĝante perkon ne tute freŝan.

“Kion vi diras, Frederiksen?” demandas la estrino suspekteme.

“Mi parolas kun la fiŝo.

“Kaj kion diras la fiŝo?”

“Ho, mi nur demandis ĝin, ĉu ĝi vidis mian fotilon, kiun mi perdis en la maron pasintan semajnon, sed ĝi respondis, ke la pasintajn du semajnojn ĝi tute ne estis en la maro...!”

Gravaj Esperanto-eventoj

Merkredon la 1an de marto en Clarence Park ekde la 18a horo parolos Gordon Coleman pri sia vivo.

Dimanĉon la 5an de marto, ekde la 16a horo, ni ĉiuj marŝos, en Rymill Park, surhavante niajn verdajn T-ĉemizojn por aspekti esperantistece, kontraŭ Malriĉeco! Por pliaj informoj bonestu kontakti Indrani, 8268 4021.

Merkredon la 15an de marto en Clarence Park ekde la 18a horo parolos Trevor Steele pri sia vivo.

Dimanĉon la 2an de aprilo ni prenos parton en “Kajtotago” en Semaphore. Pliajn informojn donos Katja, telefono 8341 5506.

Merkredon la 5an de aprilo en Clarence Park ekde la 18a horo parolo Indrani pri sia vivo.

Merkredon la 19an de aprilo en Clarence Park ekde la 18a horo parolos Annie pri sia vivo.

Merkredon la 3an de majo en Clarence Park parolos Ashley ekde la 18a horo pri sia vivo.

Sabaton la 13an de majo je la 17a horo okazos Teatraĵa Vespero (ĉiu el ni prezentos ion) ĉe Pat Palmer, 4/28 Hampton Street North, Goodwood, S.A. 5034, telefono 8272 1515.

Merkredon la 17an de majo okazos bonega kunveno en Clarence Park je la 18a horo.

Ĝuu du tagojn da Vintrokursaro de "Esperanto en Sudaŭstralio" ekde la 3a ĝis la 4a de junio en Hackham South Primary School!

La 91a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 2006 en belega Florenco, Italujo.

Sabaton la 24an de septembro ni ĉiuj ekskursos al Haveno Viktoro.

Dimanĉon la 15an de oktobro, je la 18a horo, okazos kantado, pian- kaj mandolinmuziko ĉe Indrani, 1/20 Fletcher Street, Woodville North, S.A 5012, telefono 8268 4021.

La 22a Somerkursaro kaj Kongreso okazos en 2007 en Hobarto, Tasmanujo.

El lerneja eseo:

"Mia vidkapablo fariĝis ĉiam pli kaj pli malbona. Finfine mi decidis ke miaj haroj estu tondataj!"

Ankoraŭ aĉetebblas

kelkaj T-ĉemizoj. Ni havas kelkajn malgrandajn, mezgrandajn, grandajn, elefantgrandajn kaj balengrandajn T-ĉemizojn, kiuj sendube plibeligos vian esperantistecan aspekton dum nia Marŝo kontraŭ Malriĉeco en Rymill Park.

Kontaktu Indrani, kiu vendas ilin!



"Nu, Henriko, ĉu vi lernis ion en la lernejo hodiaŭ?"

"Ne, nenion. Sed mi instruis al iu sinjorino kiel literumi "kato" ĉar ŝi daŭre demandis min!"

Nur unu novsudkimro kaj nur unu sudaŭstraliano

Dum la jarkunveno en la feriejo "Kianinny" januaron 2006, estis elektita la jena estraro de A.E.A.: prezidanto, Igor Couto; vicprezidantoj, Marcelo Leereveld kaj Sandor Horvath; sekretario, Miranda Lutz; vicsekretario, Ivan Heldzingen; kasisto, Steve Pitney; Vickasisto, Heather Heldzingen.

"Sed, kara filino, vi ne povas aspekti tiel, kiam vi eliros kun Marcelo."

"Ne gravas kiel mi aspektas. Ĉu vi ne scias, ke amo estas blinda?"

Io en la ujo

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto estas al iuj esperantistoj preskaŭ Sankta Skribaĵo, ĉu ne? Ili obeas pli- malpli rigore ĝiajn ordonojn, kvankam Zamenhof diris, ke oni ne povas havi du signifojn al la sama vorto.

Mi bonege scias, ke la Akademio de Esperanto antaŭ iom longe deklaris, ke la ĝusta finaĵo de landnomoj estu "io", sed mi scias ankaŭ, ke Zamenhof diris, ke por landoj de la malnova mondo, ĝi estu aŭ "ujo" aŭ "lando". Zamenhof diris eĉ, ke "io" estas "nedifino pronomo, montranta iun objekton, aferon, ideon: *pli bona io ol nenio*; *kiam vi ekparolis, ni atendis aŭdi ion novan*."

Estas en Barato pluraj centoj da lingvoj, se ne pli, kaj unu el ili nomatas "hindia". Se ni kredu la Akademion – kaj Plenan Vortaron de Esperanto, tiu vorto "hindia", rilatas do al la granda lando "Hindio", kiu ĝuste estas "Hinduĵo" pro evidentaj tialoj. Sed "hindia" estas la nomo de nur unu el multaj lingvoj en Barato, aŭ se vi preferas, "Hinduĵo", ĉar ankaŭ ĝi apartenas al la malnova mondo!

Nu, sendube la plej multaj el vi preferas uzadi la malĝustan finaĵon “io”, eĉ al landoj de la malnova mondo, ekz. Francujo kaj Germanujo, ĉu ne? Vi tre feliĉe kaj sen konscienciproĉo skribas kaj diras “*Francio*” kaj “*Germanio*”, kvankam vi jam aŭdis, ke tio neniel ĝustas.

Vi konsultu vian Sanktan Skribon! En ĝi estas skribite, ke “*Francio*” estas *elemento*, atomnumero 87, *atompezo* 223, *Fr*. Pri “*Germanio*” ni legas, ke ĝi estas *elemento*, *malofta metalo*, *atomnumero* 32, *atompezo* 72,6, *Ge* (=germaniumo): *~a klorido*, *GeCl₄* aŭ *GeCl₂*; *~aj kombinaĵoj*. *~ato*. *Salo de la ~ata acido*, *H₂GeO₃*. Vi celas skribi landojn, sed ili neniel povas esti landoj!!!

Mi invitas vin ĉiujn pli serioze trastudi vian Plenan Ilustritan Vortaron aŭ “Lingvaj Resondoj”, eble ankaŭ vi povos trovi pli da tialoj kial ne plu misuzi la finaĵon “io”!

“Kial vi farbis unu flankon de via aŭto ruĝa kaj la alian blua?”

“Laŭ mia opinio tio estas bonega ideo. Vi devus esti aŭdinta kiom la atestantoj kontraŭdiris unu la aliajn en la juĝejo post mia kolizio kun alia aŭto pasintan vintron!”

Forpasis Poul Thorsen

La 30an de januaro forpasis la dana Esperanto-poeto Poul Thorsen en la aĝo de 91 jaroj. Thorsen, kiu profesie estis instruisto, lernis Esperanton en 1931 kaj jam baldaŭ ekaktivis en la laborista Esperanto-movado. En 1937 li unufoje prenis parton en la SAT-kongreso en Roterdamo, invitante tie al partopreno en la SAT-kongreso en Kopenhago en 1939, kiun li organizis kune kun Paul Neergaard.

En la 50aj jaroj Thorsen gajnis plurajn premiojn en la Belartaj Konkursoj de U.E.A. De 1954 ĝis 1962 li gvidis la eldonejon “Koko” kaj estis kunredaktanto de la altnivela kultura-literatura revuo “Norda Prismo” de 1957 ĝis 1974. Liaj ĉefaj eldonitaj verkoj, kiujn ofte karakterizas

satira humuro, estas la poemaroj “Rozoj kaj urtikoj” (1954), “Sen paraŝuto” (1963), “Gruk” (de Kumbel, 1956), “Pluk: miniaturoj” (1960); “Du el” (kun Marjorie Boulton, 1985), la rakontaro “Stokita vino” (1995), kaj la rememoroj “Babile kun mi mem” (1996). Grandaj ŝatokupoj de Poul Thorsen estis, kiel li mem diris, “ekscesa vojaĝemo” – li vizitis pli ol 80 landojn – kaj fungoj, pri kiuj li longe estis ankaŭ fakdelegito de U.E.A. Membro de U.E.A. li estis ekde 1947. En 1997 li kaj lia edzino Roma donacis al U.E.A. grandan monsumon por starigi la kason Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen, kiu intertempe helpis kelkdekon da Esperantobibliotekoj por pliriĉigi siajn kolektojn.

El Gazetara Komunikado de U.E.A.

EU-retejo kapitulacis post plendoj de esperantistoj

La retestro de la prilingva retejo de la Eŭropa Unio kapitulacis antaŭ la ferocaj atakoj de irititaj esperantistoj. La retejo ne plu asertas, ke artefaritaj lingvoj kiaj Esperanto ne havas historion, kulturon aŭ denaskajn parolantojn.

La tuta alineo, kiu celis montri kial Esperanto ne taŭgas por uzo en EU, estis forviŝita la 30an de januaro. Almenaŭ ĝis la 3a de februaro nenio nova aperis en ĝia loko. Evidente al EU mankas seriozaj argumentoj kontraŭ Esperanto.

“Mi prefere iru hejmen nun, antaŭ ol mi tro ebriiĝos”.

“Sed, Trevor, vi jam estas hejme!”

Filmo pri esperantistoj en rusa tutlanda televido

La 22an de februaro la rusa televido montris la unuan parton de triparta filmserio pri okazaĵoj komenciĝantaj en Esperanto-klubo en periferia urbeto rusa en la 1920aj jaroj. La ĉefrolulo de la filmo estas unu el la klubanoj, kiu nur post kvindek

jaroj sukcesas malkaŝi la sekreton de mortigo, okazinta en klubkunsido. La filmo estis montrata tuj post la ĉefa vespera novaĵelsendo en la “unua kanalo”, unu el la plej popularaj tutlandaj televidkanaloj en Rusujo. La programoj de la kanalo estas vaste rigardataj ankaŭ en aliaj landoj de la eksa Sovetunio. Laŭ la verkinto de la manuskripto, Esperanto en la filmo funkcias kiel modelo de ajna ideologia movado.

S-roj Nigro kaj Blanko estis bonegaj amikoj, sed tre iritis Nigron ke Blanko ĉiam respondis al ĉio tiele: “Tio povus esti ankoraŭ pli malbone!”

Iun tagon Nigro diris: “Ĉu vi aŭdis kio okazis al la geedzoj Verdo?”

“Ne”, respondis Blanko.

“Nu, Verdo estis for pro iu komerca afero, kaj retrovenis hejmen unu tagon pli frue ol planite. Li trovis sian edzinon kun ŝia amanto en la geedza lito. Li tuj prenis sian pafilon kaj pafmortigis ilin ambaŭ. Poste li mortpafis ankaŭ sin”.

“Nu, sed tio povus esti eĉ pli malbone”, diris Blanko.

“Blanko, vi certe estas neŝanĝebla”, diris Nigro kolere. “Tri homoj mortis, kio povus esti pli malbona?”

Trankvile respondis Blanko: “Se Verdo estus retroveninta unu tagon pli frue, tiam tiu en la lito estus mi!”

(Tiu estas kontribuita de Alano Mendelawitz)

Ankaŭ vian kotizon

Nun refoje estas tempo por pagi sian kotizon al “Esperanto en Sudaŭstralio”, jam pagis la sekvantaj membroj:

Arturo kaj Libby; Audrey kaj Bob; Jennifer; Katja kaj Trevor; Helen kaj Sandor; Indrani kaj Pat Palmer.

Ordinara membro: \$30; familiaj membroj: \$35; pensiulo: \$20; familiaj pensiuloj: \$25 kaj gejunuloj po \$10.

Ankaŭ vian kotizon akceptos nia kasistino, Indrani, sed se vi decidus pagi

dum marto, tiam vian kotizon akceptos Audrey Felby!

Virino donis al la buskonduktoro bankbileton centdolaran:

“Mi tre bedaŭras, ke mi ne havas unudolaran moneron.”

“Ne ĉagreniĝu”, respondis la buskonduktoro, “tre baldaŭ vi havos 99!”

Benedikto ne benis la esperantistojn

La nova papo, Benedikto, ne daŭrigis la multjaran tradicion de sia antaŭulo, Johano Paŭlo la 2a, pri kristnaska saluto en Esperanto. Pasintjare Johano Paŭlo la 2a post sia tradicia kristnaska mesaĝo diris bondeziran frazon en 62 lingvoj, inter kiuj estis Esperanto. En Esperanto Johano Paŭlo la 2a diris: “Dibenitan Kristnaskon kaj Prosperan Novjaron”. La nova papo decidis duonigi la kvanton de lingvoj. Inter la 32 lingvoj, kiujn li uzis nun krom Esperanto mankis interalie ankaŭ la litova, la ĉeĥa kaj la slovaka. La vatikana radio anoncis, ke papo Benedikto bondezirus en aliaj lingvoj en postaj salutoj, supozeble jam paske, kiam li faros sian sekvan paroladon “Urbi et Orbi”, “Al la urbo kaj al la mondo”. Ĉu li tiam salutos en Esperanto ne estas konate, sed la forfalo de Esperanto post la unua kristnaska saluto de la nova papo klare indikas ĝian malaltan prioritaton.

Same kiel dum la antaŭaj paroladoj “Urbi et Orbi”, kristnaske kaj paske, ankaŭ ĉifoje grupo de esperantistoj ĉestis en placo de Sankta Petro en Romo por alten levi panelojn, kiuj konsistigis la vorton Esperanto. La ŝildojn oni ĉifoje tamen povis vidi nur tre fone dum la televida elsendo.

Unu junulo al alia: “Devas esti bonege esti kuracisto. Ĉu vi povas imagi alian okupon, en kiu oni povas ordoni al virino senvestigi sin, kaj poste sendi la fakturon al ŝia edzo?”